
ESPERANTO-INFORMILO



Foto: "Babila Rondo" la 26-an de septembro '23 en Stattkafejo

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

La oktobra eldono de la Esperanto-Infomilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono

Redaktoro teamo:

Georg Hennemann

Ulrich Fellmann

Korektanto: Ulrich Fellmann

Esperanto-Gesellschaft

Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender: Georg Hennemann

georg.hennemann@t-online.de

Rehgartenstr. 16

35683 Dillenburg

Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01

BIC: DRESDEFFXXX

bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende

Klub-vesperoj

Dienstag, d. 3. Oktobro 23

mardon, la 3-an de oktobro 23

19:00 h MEST per Zoom

19:00 h MEST per Zumo

Offene Sprachrunde - entfällt wegen des Feiertags Malferma babila rondo – nuligita pro festotago

Dienstag, d. 10. oktobro 23

mardon, la 10-an de oktobro 23

19:00 h MEST per Zoom

19:00 h MEST per Zumo

Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)

Fermita babila rondo (nur klubanoj)

Zoom-Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 17. Oktobro 23

mardon, la 17-an de oktobro 23

18:30 h MEST surloke

18:30 h

Sprachrunde: F. Lappe

18:30 h

Babila Rondo: F. Lappe

19:30 h

Vortrag: A. Stecay
"Über Sexismus"

19:30 h

Prelego: A. Stecay
„Pri seksismo“

mardon, la 24-an de oktobro, 23

ekde la 19h horo:

Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Naskiĝtagoj

En oktobro festos sian naskiĝtagon:

25.10. Thomas Frübis

Ni kore gratulas!



Antaŭanoncoj:



Mardo, 19.12.23
18:30-21:30

ESF kristnaskfesto en Saalbau MÜZ. Ĉiu pripensu kielmaniere kontribui, ĉu per kristnaska dekoracio, muziko, prelegeto, poemo, kuketo(j), trinkaĵoj ktp.

Kion celas la biciklistaj manifestaciantoj de la infana maso ?

lomete mokema eseo de G. Hennemann

La lastan semajnfino mi kun mia amikino ekskursis al malnova ĉefurbo Bonn kaj dimanĉe matene de tie ekbiciklis al urbo Kolonjo laŭ la liva bordo de la Rejno-rivero. Estis belega kaj varma aŭtuma tago kaj ni multe ĝuis la ŝiptrafikan etoson kaj la amason da ekskursantoj promenantaj, biciklantaj aŭ ripozantaj apud la riverborda vojeto. Precipe la novkonstruita promenadvojo flanke de la liva riverkajo en Kolonjo, kiu antaŭ dek jaroj ankoraŭ estis privata areo kun haveninstalaĵoj kaj barita por la publiko, nun estas tute trapasebla kaj ekde tiam ekaperis multaj novaj kafejoj kaj rapidmanĝejoj kiuj allogas la preterpasantojn. Kiam ni atingis la pozicion de la famkonata Ĉokoladmuzeum kaj transiris la ŝtalonon por daŭrigi nian bicikladon ĝis al la ĉefstacidomo, nia vojo tamen estis barita pro longa vico de biciklantoj kun ruĝ-blankaj flagoj (rim.: tiuj estas ankaŭ la koloroj de la kolonia blazono) kun la motivo "kidical mass", libere tradukita kiel "infana maso" (ne miksu kun la "infana raso" de William Auld). KM estas elkreskaĵo de la t.n. "kritika maso" (angle: critical mass, CM), kiu estas pli malpli spontana grupa biciklado de 16 ĝis 100 biciklistoj, kiuj kunbiciklas en bloko tra urboj kaj ne devas esti antaŭe registrita, almenaŭ laŭ la germana leĝo.

Kidical Mass (foje Kiddical Mass, KM) kontraŭe estas organizita biciklado, ofte uzante publikajn vojojn en urboj kaj grandurboj. La veturoj estas senpagaj kaj malfermaj al ĉiuj, kun plenkreskuloj agantaj kiel sekurecaj marŝaloj. Male al CM, la itinero estas planita anticipe kaj oficiale registrita. Veturadoj estas kutime inter 2 kaj 5 mejlojn longaj.

La Movado KM celas pli sendanĝerajn urbajn stratojn kaj publikajn lokojn por infanoj postulante i.a. strikte separitajn biciklovojojn apud aŭtostratoj kaj pliajn restriktilojn kontraŭ aŭtotrafiko – do ĉion por la bono de la infanoj kaj sekve ankaŭ por piedirantoj kaj biciklantoj.

La origina CM originas el usono, kie unuafoje en la jaro 1992 en San Francisko okazis tiu evento kiu nun tipe estas okazigita la lastajn vendredojn en la monato. En vikipedio ni legas pri CM: „La Kritika Amaso estas formo de rekta ago, en kiu homoj vojaĝas kiel grupo sur bicikloj en fiksita loko kaj tempo. La ideo estas, ke homoj grupiĝu por sekure veturi per bicikloj tra siaj

stratoj, surbaze de la malnova diro: "Estas sekureco en nombroj". Partoprenantoj insistis ke tiuj okazaĵoj devus esti rigarditaj kiel "festadoj" kaj spontaneaj renkontiĝoj, kaj ne kiel protestoj aŭ organizitaj manifestacioj."

Nun, kiam mi vidis centon da motorbicikloj de la polico kun iliaj bluj signallampoj eskortantaj la kohortojn de manifestantoj mi demandis min, ĉu la origina celo de tiu movado, nome „spontaneaj renkontiĝoj por ĝui la grupetoson“, ankoraŭ validas. La infanoj, kiuj kunveturis kun iliaj etaj infanbicikloj certe ne povis ĝui tiun bicikloroson same kiel iliaj gepatroj kaj la aliaj plenkreskuloj. Mi eĉ vidis infanon preskaŭ akcidenti kaj faleti: Ĉu pro lacego aŭ pro la distraĵo mi ne povis konstati. Mi ne volas entute kritiki ĉi tiujn grandajn manifestaciojn de organizaĵoj kiel KM, sed mi havis la impreson ke oni misuzas infanojn kiel premilo por plenumi politikajn postulojn. Mia opinio, la spertita manifestacio en kolonjo tre evidente jam transpasis la originan celon kaj nun preskaŭ nur ĝenas tiujn en ĝi implikitajn personojn kaj la eldiro pravas, ke „la revolucio iom post iom formanĝos ĉiujn siajn infanojn kaj fine naskos despotismon kun sia tuta petolo.“

Ĉiukaze pro la KM-korso ni devis devojigi kaj ŝovi niajn biciklojn tra la homplenaj stratetoj de la amuzmejo en la malnova urbokvartalo de kolonjo (dt: Altstadtviertel von Köln), por ne maltrafi nian trajnon reen al Dillenburg. Do venontfoje ni planu nian ekskurson ankoraŭ pli bone kaj plejeble evitu la urbocentron, kie organizaĵoj kiel "vendredoj por la futuro" aŭ „infana amaso“ ne malofte eĉ samtempe manifestacias.

Postskripte: Kiam en urbo Siegen ni ŝanĝis la trajnon por pludaŭrigi nian trajnveturadon al Dillenburg, la germana fervojo laŭtparolile anoncis ke ĉiuj trajnoj cele al Gießen kaj Frankfurto ĝis la venontan matenon nur veturos ĝis najbara urbo Herborn pro „nedejoranta oficisto en signalejo“ de urbeto Sinn ĵus post Herborn. Ankaŭ la „Fervoja anstataŭa transporto“ (dt: Schienenersatzverkehr) ne realigeblas pro manko de busŝoforoj. Mi ŝerce diris al mia amikino ke verŝajne ankaŭ la busŝoforoj manifestacias en kolonjo.

Ligilo: [https://en.wikipedia.org/wiki/Critical_Mass_\(cycling\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Critical_Mass_(cycling))

Rakonto

„Pasporto al la tuta mondo“, de Ulrich Fellmann

"Ho mises Monpfenigo! Kiel 'stas?"
"Bonege, Ĝejmz! Bonege revidi vin! Kaj elegante vestite, kiel ĉiam!"
Ŝi ŝatas mian ludon kopii la konversaciojn kiujn la filmagentoj antaŭ 50, 60 jaroj havis kun la ĉefsekretariino de Q.
"Ĉu vi jam havas planojn por hodiaŭ vespere?"
"Bedaŭrinde jes, Ĝejmz. Sed venontfoje..."
Ŝi ne povis diri ion alian, ŝi ja estis bone programita servoboto.

Post tiu flirtado mi pluiris en la esploralaboratorian halon, tra ordinara ligna pordeto.

"007!"
"Q!"
"Sekvu min, mi montros al vi nian plej novan inventon, kiun vi kunportos al via nova misio!"
"Aparato, singulare? Ĉu ne la kutimaj pafantaj manum-butonoj, eksplodigaj skribiloj, kaj grandiozan aŭtomobilon, kiu plenas de novteĥnikaĵoj? Mi atendis ke aktuale la aŭto estas eĉ flugebla."
"Tiel ne estas, Ĝejmz, sed teĥnike eĉ pli avancita."
"Mi sciemas. Surprizu min!"
Kaj li faris.

Ok tagojn poste, mi surterigas aviadile en la ĉefurbo de...

"Via pasporto, bonvolu!"
Li alparolis min en la landa lingvo, mi ŝajne do aspektas kiel enlandulo.
"Volonte!" mi aŭdas min diri en lingvo, de kiu mi antaŭ kelkaj tagoj ne sciis eĉ unu vorto. Mi metas la pasporton antaŭ li surtablen, kie li studas ĝin, nun skanas eĉ per cifereca legilo. Mi provas ne montri signon de streĉo. Eraro aŭ mispaŝo estus nun tre danĝera, esti rekonata gvidus al la plej malbonaj konsekvencoj. Li redonas al mi la pasporton kaj salutas min.

Dek minutojn poste mi havas mian valizon kaj sidas en taksio al la hotelo. Ĉio ŝajnas iel

nereala. Mia pasporto estas fakte superkomputilo kun AI de la plej nova versio, kun generilo de videobildo de iom ŝanĝita vizaĝo mia, kiu tuje tradukas ĉion diritan de aliuloj kaj projekcias ĝin en elektronikan ĉipon en mia cerbo, kaj rezulte de miaj mezuritaj pensoj produktas parolfrazojn en la loka lingvo por la aliulo. Funkcias kiel magio... sed eĉ pli grandioze: pasporto povas ŝanĝi sian montratan enhavon, ŝajnigi esti ĉiu dokumento, permesilo, identigilo, kiun vi aktuale bezonas. Dum unu sekundo ĝi ŝanĝiĝas de identigilo de saŭdarabia ambasadoro al irana sekretserva agenteo aŭ nordkorea sciencisto pri nukleaj armiloj kun aliro al la nordkorea ŝtatestro.

Dum la taksia vojaĝo mi tamen iel bedaŭras la teĥnikan evoluon kiu gvidis al tiaj mirakloj. Mi revas pri la tempoj kiam sinjorino Monpfenigo ankoraŭ estis homo, kaj kiam mi devis atingi miajn spionajn celojn per propraj kapabloj, inteligenta analizo, kaj foje uzo de korpofortoj.

Apud la hotelo mi pagas la taksiiston kaj eniras la hotelan ricevejon, kaj post regulado de la formalaĵoj mi perlifte kaj piede atingas mian ĉambron, 712. Mi malfermas la pordon kaj eniras.

"Mises Monpfenigo!"
"Ĝejmz!"
"Kiel... kion..."
Ŝi ridetas.
"Mi ne estas Monpfenigo, nek realhome, nek ŝia robota kopio. Mi estas agenteo 008 de viaj kontraŭuloj. Kaj via kariero finiĝas nun kaj ĉi-tie."
"Sed... kiel..."

"Mi uzas la saman teĥnikon kiun Q donis al vi. Per universala pasporto mi eniris vian landon, kopiis la ĉefsekretariinon, eniris la sekretservan domon, prenis ŝian lokon, kaj manipulis vian pasporton por ke ĝi utilu al ni."

"Sed pro kio la longa flugo ĉi-tien, se vi volas min tuj "malŝalti"?"

"Ne estis iu flugo. Via universala pasporto enmetis la bildojn de la vojaĝo per la cerba ĉipo en vian menson. Vi ankoraŭ estas en Londono, sed sufiĉe for de via agenta ministeria buroo." Ŝi faras viŝan geston, kaj la hotelĉambro malaperas.

"Kaj tio estas via fino".

Postrimarkigo: Kiam la virtuala nerealo malaperintis, agento 007 estis denove en sia

elemento. Aŭtomatismoj ekfunkciis, lia pistolo estis preta en la jako, kiam lia mano aŭtomate ĝin prenis li kalkulis kiel li optimume agu, estis krom la falsa Monpfenigino du aliaj agentoj, ili ne atentis bone, triumfantaj super lia kaptiteco kaj konvinkita pri lia surpriziĝinstigita paralizo ili reagis tro lamaj kaj li - paf - paf - paf - bezonis nur du sekundojn por malŝalti la tri. Poste li prenis sian saĝtelefonon por informi Q.

"Ho mises Monpfenigo! Kiel 'stas?"

"Bonege, Ĝejmz! Bonege reaŭdi vin! Kiel estas vi?"

"Same bonege! Mi tre ŝatas aŭdi vian voĉon, se eĉ vi estas nur roboto!"

"Ĝejmz! Vi flatas min!"

"Jes. Tiel faras vera agento 007."

--

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Studento al profesoro: - Sinjoro profesoro, via nova libro pri kvantuma fiziko estis vere kompreneble skribita.
Profesoro: - Belege, tiam vi ja certe kapablas ekspliki al mi, kion mi ne komprenis pri ĝi.

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi ĉi-monate prezentas, temas pri modereco:

„Vivo sen modero kondukas al mizero“

Tiu ĉi proverbo estas ja koncentrita vero, almenau se oni rilatas ĝin ne al singula homo, sed al la tuta Homaro vivanta sur limigita planedo.

Fonto: http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002602.htm

Enigmo (de Felmano Ulriko)

Ĉi-foje mi traktas signifojn, por kiuj la plej multaj lingvoj ne havas apartan vorton. Foje, la afero aŭ sento mem ekzistas nur en unu aŭ malmultaj lingvoj, foje, oni konas tiun aferon aŭ senton, tamen, ne ekzistas aparta vorto por ĝi en la propra lingvo. Ekz-e, en la ĉeĥa lingvo ekzistas verbo kiu signifas "turnante kulereton por skrapo la internan randon de kafotaso". Kaj estas tiu forta dormemo estiĝanta post la tagmanĝo kiun multaj homoj sentas, la germanlingva "Suppenkoma" kaj itallingva "abbiocco", por kiu tamen multaj lingvoj ne havas trafan vorton. Kaj kiu de vi ne jam spertis post vizito de harfrizisto la senton, ke oni aspektas malpli bele ol antaŭe? Por tio la japanoj havas la vorton "age-otori".

Nun la tasko: kiun vorton vi

a) en Esperanto,

b) en la germana lingvo

uzus por esprimi tion, kion la sekvaj vortoj en aliaj lingvoj esprimas? Elektu plejble mallongan kaj similsignifan esprimon aŭ frazeton. Mi donas la vorton kaj koncizan klarigon:

(1) akihi (haŭajia) = tuj forgesi, kiun vojon oni prenu, kvankam ĵus iu klarigis tion.

(2) arbejdsglæde (dana) = ĝojo kaj kontento kiel rezulto de propra laboro.

(3) arriviste (franca) = ambicia socia leviĝisto kiu uzas foje temerarajn metodojn.

(4) betsubara (japana) = loko en la korpo kiu ebligas manĝi deserton kvankam oni estas tute sata kaj ne povus plumanĝi iom de la ĉefa manĝaĵo.

Kiel vi tradukus esperantlingven, kiel germanlingven?

Solvo de la enigmo de la lasta ei:

La serĉita nomo estis Giuseppe Peano. La de li kreita lingvo nomiĝis Latino sine flexione.

Bedaŭrinde, neniu alsendis la solvon.

Lasta paĝo

Pri Hajko kaj tranĉiteco

Aŭtoro: **Hirota Masaaki (ひろたか)**, https://eo.wikipedia.org/wiki/Hirota_Masaaki

Dato: 2010/03/07(Dim) 00:14, tirita el <https://www.vastalto.com/hajko/ark11.html>

„Ekzistas ne malmultaj hajkoverkantoj en Esperanto. Tamen iliaj kompreno pri tio, kio estas hajko, estas malsamaj. Unuj verkas hajkojn kun sezoneco, sed aliaj ne. Kelkaj opinias, ke hajko estas simple mallonga poemo kun fiksita formo, sed kelkaj opinias, ke ne. Unu sola komuna kompreno pri esperanta hajko estas tio, ke ĝi konsistas el 5, 7, 5 sume 17 silaboj en tri linioj.

Mi pensas, ke hajko estas poemo en vasta senco. Sed hajko ne estas poemo en la senco, ke ĝi sekvas la tradician okcidentan poemteorion. La esenco de hajko konsistas en ĝia tranĉiteco. Hajko eltranĉas momentan figuron el la mondo.

Mi volas montri ĉi tion per miaj verkoj ĝisnunaj kaj denunaj. Estas ekzamenenda, ĉu mi vere sukcesis montri tion per miaj verkoj. Do kritikantoj estas bezonataj.”

Aŭtuna Vento

ŝultro ĉe ŝultro,
katidoj senhejmaj
en ombro arbusta

sinkanta suno -
radioj penetre
en mian ĉambron

plukante herbojn,
edzino priparolas.
siestas kato.

ĉe matenmanĝo,
interparolado pri
farbitaj floroj

blankaj linioj
sur sportejo; kanaoj
profunde ruĝaj.

kato hezitas
eliri ĉe la pordo.
restas varmego.

vesperlilioj -
jen kampo sin etendas
ĝis la ĉielo.

maizoj vice
sekigitaj; stacio
sen deĵoranto.

simi-fajfilon
blovas prove, viro kun
knaba mieno.

gasteja plado -
garne persimona folio
jam ruĝa

tra kosmoskampo
vokoj de gejunuloj -
monto ekstare

la stacidomo
forlasita dum jaroj -
kanaoj floras.

tra grizaj nuboj
aviadilo sen sono -
aŭtuna ŝtormo.

en la bankuvo
plena de varma akvo -
nokta ĉirpado.

lasu malfermita
la fenestron; certe jam
aŭtuna frisko.

koridoro al
radiografia ĉambro -
aŭtuna helo.

paperfaldita
aviadilo - alten
en klaran aeron.

tiu ĉi strato,
en kiu vi loĝas; jen
ĉina hibisko.

muzikpaperon,
unu folion blovis
aŭtuna vento.

sopirante al
blankaj nuboj, estas en
aŭtuna vento.

-- 2003.09.20

<https://www.vastalto.com/hajko/hajko02.html>

--